## Veranstaltungshinweise

Wir haben Esp.-Lernrunden für Anfänger (Einzelheiten: Anne; s. Impressum) u. Fortgeschrittene (do. 20:30-21:15 Uhr per Skype). Und:

| | | |
|---|---|---|
| 31.05.2018 19:30 Uhr | *Wiechmanns Weserhotel,* Mitteldeichstr. 51, 26919 Brake | Vereinstreffen |
| 16.08.2018 19:30 Uhr | *Kogge*, Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth | Vereinstreffen |
| 20.09.2018 19:30 Uhr | *Heidekate*, Melkbrink 49, 26121 Oldenburg | Vereinstreffen |
| 18.10.2018 19:30 Uhr | *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Stadland | Vereinstreffen |

Gäste sind willkommen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite (s. unter „Impressum") entnommen werden; allerneueste Infos: https://twitter.com/egu1995. Außerdem:

| | | |
|---|---|---|
| 18.-21.05.2018 | 95. Deutscher Esperanto-Kongress | Zweibrücken |
| 14.-22.07.2018 | Sommer-Esperanto-Studierwoche | Liptovský Mikulaš, Slowakei |
| 28.07.-04.08.2018 | 103. Esperanto-Weltkongress | Lissabon, Portugal |
| 04.-11.08.2018 | 74. Internat. Jugend-Kongress | Badajoz, Spanien |
| 14.-16.09.2018 | Beneluksa Kongreso 2018 | Houthalen, Belgien |

Mehr: http://eventoj.hu/kalendaro.htm

**Am 21.07.2018** wird die Gruppe Freundeskreis (bekannt durch u. a. „Esperanto") beim Deichbrand-Festival in Wanhöden auftreten (https://goo.gl/B5NUWg).

---

**Impressum:**
*Zeitschrift:* Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
*Erscheinungsweise:* dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe,
Netzseite: http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm
*Herausgeber:* Esperanto-Gruppe Unterweser e. V. (http://www.esperanto.de/unterweser)
*Information und Redaktion:* Anne Höpken, Schulstr. 13a, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837;
Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368;
Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044;
Mario Müller, Tel.: 04732-1373
*Bankverbindung:* Raiffeisenbank Oldenburg eG,
IBAN: DE26280602281200160000
Kassenwartin: Dörte Bierkämper

***E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.***

# Esperanto Gazeto

**N-ro 52** ISSN 1861-3330 **Jun. – Sep. 2018**
EGU-Info: http://www.esperanto.de/unterweser



**Herzberg, 09.03.2018, Bildungsurlaub der Volkshochschule Osterode-Göttingen:** Die Kursleiter Peter und Zsófia sowie die Teilnehmer (u. a. Stefan, Brigitte und Elisabeth) mit den Teilnahmebescheinigungen.
**Herzberg, 9a de Marto 2018, kleriga libertempo de la popolaltlernejo Osterode-Göttingen:** La kursgvidantoj Peter kaj Zsófia kaj krome la partoprenantoj (interalie Stefan, Brigitte kaj Elisabeth) kun la partopren-atestiloj.

**Kleriga libertempo de la popolaltlernejo Göttingen en Herzberg**
**(Herzberg, 5a ĝis 9a de Marto 2018)**

Tri membroj de nia klubo partoprenis la klerigan libertempon en Herzberg, nome Stefan, Brigitte kaj Elisabeth. Temis pri oficiala kleriga semajno flanke de la popolaltlernejo (VHS) de Osterode-Göttingen. Ni estis sesope dum la tuta tempo kaj tre intense lernadis po ok horoj tage. La kurson por komencantoj gvidis Peter Zilvar; tiun por progresantoj, en kiu Stefan, Brigitte kaj mi partoprenis, gvidis Zsófia Kóródy. Ŝi tre lerte kaj sperte gvidis nian kurson, demandante dum la unua tago, kiujn lingvajn problemojn ĉiu el ni ŝatus solvi. Laŭ tiuj proponoj ŝi strukturis la kurson laŭ gramatikaj demandoj kaj ekzercoj, pligrandigo de la vortprovizo kaj plibonigo de la parolkapablo. Ŝi ofertis diversspecajn metodojn kun bonhumoraj tekstoj, kiuj tre amuzis nin kaj kreis senstreĉan lernan etoson dum la semajno. Ŝi elektis bonkvalitajn kaj aktualajn tekstojn por la diskutrondoj kaj vere tre facile kompreneble klarigis gramatikaĵojn. Krome ni havis sufiĉe da tempo por konatiĝi kun la tutdiversaj agadoj de la Esperanto-urbo Herzberg kun siaj multkoloraj Esperantaj ofertoj en la urbo mem. Kelkaj ekzemploj: vojo de la pomarboj, biblioteko, stokoj de Esperantaj libroj, Esperantaj vojindikiloj kaj ripozbenkoj donacitaj de esperantistoj. Entute estis ĉarma lernada kaj klerigada semajno en bonhumora etoso. Mi jes plilarĝigis mian horizonton lingve kaj turisme. Mi tre rekomendas al vi ĉiuj la partoprenon al tiaj kursoj! – Elisabeth

**34a Printempa Semajno Internacia (34a PSI)**
**(Plauen, 30a de Marto ĝis 6a de Aprilo 2018)**

Senti sin kiel fajrobrigadist/ino – ĉirkaŭata de multaj uzaĵoj kaj ilaro de fajrobrigado, en reala malnova fajrobrigada domo, kun la ebloj eĉ uzi la malnovan glitstangon kaj eĉ porti fajroestingan ekipaĵon dum la kostuma balo?
Dum la ĉi-jara PSI-aranĝo de la Germana Esperanto-Asocio renkontiĝis pli ol 100 partoprenantoj el dek landoj en la junulargastejo de la urbo Plauen, kiu situas en la malnova domo de la fajrobrigado en la centro de Plauen. Tradicie la PSI-programo ofertas Esperanto-kursojn (por infanoj, komencantoj kaj progresintoj), prelegojn (pri diversaj temoj), sport-, muzik- kaj dancekzercadojn kaj diversajn manlaborgrupojn. Tiuj ofertoj okazas dum jenaj tempaj blokoj: matene antaŭ la matenmanĝo 30 minutojn, antaŭtagmeze dufoje 90 minutojn



# *Enigmo*

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | |
| 2 | | | | 6 | |
| 3 | | | | | |
| 4 | | 7 | | | |
| 5 | | | 8 | | |

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de strio el ŝtofo aŭ ledo, por ĉirkaŭigi la talion.

***Horizontale***
***1:*** blanka likvo produktata de inaj mamuloj; ***2:*** preno kiel rimedo; ***3:*** kapabla facile fari ion; ***4:*** malvira [sen finaĵo]; ***5:*** optika instrumento [kun finaĵo de adjektivo]; ***6:*** mallongigo de Universala Vortaro; ***7:*** varmiĝi ĝis estiĝo de vaporo [sen finaĵo].

***Vertikale***
***1:*** liteto de tre juna infano [sen finaĵo]; ***2:*** besto proksime parenca al ĉevalo; ***3:*** portebla ujo el salik-vergetoj [sen finaĵo]; ***4:*** afero, rigardata en ĉiuj ĝiaj partoj [kun finaĵo de akuzativo]; ***5:*** havanta proksimume la formon de ovo; ***8:*** nomo de programlingvo.



*Atendas marton*
*travivontaj insektoj*
*en sola amfor'*
#hajko #printempo #esperanto

Foto und Haiku von Conny K via Twitter https://goo.gl/AxoQaC

**Bildungsurlaub der Volkshochschule Göttingen in Herzberg**
**(Herzberg, 5a ĝis 9a de Marto 2018)**

Drei Mitglieder unseres Vereins nahmen an dem Bildungsurlaub in Herzberg teil, nämlich Stefan, Brigitte und Elisabeth. Es handelte sich um eine offizielle Bildungswoche seitens der Volkshochschule Osterode-Göttingen. Wir waren zu sechst während der ganzen Zeit, und wir lernten acht Stunden pro Tag. Den Kurs für Anfänger leitete Peter Zilvar; den Kurs für Fortgeschrittene, an dem Stefan, Brigitte und ich teilnahmen, leitete Zsófia Kóródy. Sie leitete ihn sehr geschickt und erfahren, indem sie am ersten Tag fragte, welche sprachlichen Probleme jeder von uns lösen möchte. Gemäß der Vorschläge gliederte sie den Kurs entsprechend grammatikalischer Fragen und Übungen, Vergrößerung des Wortschatzes und Verbesserung der Sprechfähigkeit. Sie bot unterschiedliche Methoden mit Gute-Laune-Texten an, die uns sehr amüsierten und für eine entspannte Stimmung beim Lernen während der Woche sorgten. Sie wählte aktuelle Texte guter Qualität für die Diskussionsrunden aus und erklärte Grammatikthemen auf eine wirklich sehr einfache Art und Weise. Außerdem hatten wir genug Zeit, um die ganz verschiedenartigen Betätigungsfelder der Esperanto-Stadt Herzberg mit ihren bunten Esperanto-Angeboten in der Stadt selbst kennenzulernen. Einige Beispiele: Weg der Apfelbäume, Bibliothek, Esperanto-Bücher-Lager, Esperanto-Wegweiser und -Bänke, die von Esperantisten gespendet wurden. Überhaupt war es eine angenehme Lern- und Bildungswoche in gutgelaunter Atmosphäre. Ich erweiterte meinen Horizont sprachlich und touristisch. Ich empfehle allen die Teilnahme an solchen Kursen! – Andreas' Übersetzung von Elisabeths Artikel



kaj post la vespermanĝo antaŭ la vespera programo 60 minutojn. La posttagmezo estas destinita por ekskursoj (plej ofte du ofertoj ĉiutage), paralele okazas la junulara programo. Vespere okazas kulturaranĝo, poste filmo kun Esperantaj subtitoloj estas montrata en malgranda kinejo.
Aparte interesa en Plauen estis nokta gvidado, kiu havis kiel temon la unuan manifestacion kontraŭ la GDR-reĝimo la 7an de Oktobro 1989, pro kiu la reĝimo devis kapitulaci. Proksimume 15.000 partoprenantoj povis atingi, ke dialogo kun la urba administrantaro komenciĝis (ronda tablo). La originala, tiam ne uzata fajrobrigada veturilo kun akvokanono staras en apuda domo de la malnova fajrobrigado enkadre de malgranda ekspozicio pri tiu manifestacio de 1989. En la ĉirkaŭaĵo de Plauen situas la du plej grandaj fervojaj brikpontoj de la mondo – la tiel nomata Elster-valponto (Elstertalbrücke), kiun eblis piede esplori dum migrado kaj poste trajne transveturi. En Plauen mem oni povis viziti la Erich-Ohser-muzeon (E. O. Plauen, karikaturisto, “Patro kaj filo“) kaj muzeon, en kiu oni montras iamajn teknikojn de brodado. La plej malproksima celo estis la Audi- kaj Horch-muzeo in Zwickau - ĝi temas pri la historio de la evoluo kaj produktado de aŭtoj en la regiono (en kiu, cetere, ankaŭ la “Trabbi“ estis produktata). Vespere okazis kostuma balo (kompreneble sub la moto fajrobrigado), estis belegaj koncertoj de Ĵele (Elena Wilke el Schwedt kaj Ĵenja el Bremen kun subteno de Geomar el Kubo) kaj Kaŝi (Carsten Schnathorst el Hamburg), krome “Magia vojaĝo tra la mondo“ de Zauberbühne de Christoph Frank. Oni ankaŭ povis ĝui Pasko-fajron, kvizo-vesperon kaj la tradician internacian vesperon kun kontribuoj de la partoprenantoj. Dum la tuta vespero ĉiam estis trinkejo disponebla – tie oni multe ludis, trinkis kaj multe babilis kompreneble ĉefe en Esperanto. Resume: entute denove tre sukcesa evento, kiun la PSI-teamo organizis – al la 35a PSI en la junulargastejo en Hochspeyer 2019 ni jam aliĝis. – Brigitte, Stefan, Franz

**34. Internationale Frühlingswoche (34. PSI)**
**(Plauen, 30.03.-06.04.2018)**

Sich fühlen wie ein/e Feuerwehrmann/frau – von vielen Feuerwehrutensilien und -gerätschaften umgeben, in einer richtigen alten Feuerwache, mit der Möglichkeit, sogar die alte Rutschstange zu benutzen und beim Kostümball Originalausrüstung tragen zu können? Bei der diesjährigen PSI-Veranstaltung des Deutschen Esperanto-Bundes trafen sich über 100 Teilnehmer aus 10 Ländern in der Jugendherberge der Stadt Plauen, die in der alten Feuerwache im Stadtzentrum untergebracht ist. Traditionell bietet das PSI-Programm

Esperanto-Kurse (für Kinder, Anfänger und Fortgeschrittene), Vorlesungen (zu den verschiedensten Themen), Sport-, Musik- und Tanzübungen und unterschiedliche Handarbeits- und Bastelgruppen. Diese Angebote gibt es während der folgenden Zeiten: morgens vor dem Frühstück 30 Minuten, vormittags zweimal 90 Minuten und nach dem Abendessen vor dem Abendprogramm 60 Minuten Der Nachmittag ist für Ausflüge (meist 2 Angebote pro Tag) vorgesehen, parallel findet das Jugendprogramm statt. Am Abend gibt es eine Kulturveranstaltung, danach wird ein Film mit Esperanto-Untertiteln in einem kleinen Kino vorgeführt. Besonders spannend in Plauen war eine Nachtführung, die die erste Demonstration gegen das DDR-Staatsregime am 7. Oktober 1989, vor der das Regime kapitulieren musste, zum Thema hatte. Ca. 15.000 Teilnehmern konnten damals erreichen, einen Dialog mit der Stadtverwaltung einzuleiten (Runder Tisch). Der damals bei der Demonstration nicht eingesetzte Wasserwerfer konnte in der alten Feuerwache im Rahmen einer kleinen Ausstellung zum Thema im Original besichtigt werden.



*Plauen: junulargastejo / Plauen: Jugendherberge*

In der Umgebung von Plauen gibt es die zwei größten Eisenbahn-Ziegelsteinbrücken der Welt – die Elstertalbrücke konnte im Rahmen einer Wanderung begangen und mit dem Zug befahren werden. In Plauen selbst standen Besuche des Erich-Ohser-Museums (E. O. Plauen, Karikaturist, „Vater und Sohn“) und der Schau-Stickerei zur Auswahl. Der weiteste Ausflug führte nach Zwickau in das Audi- bzw. Horch-Museum – dort geht es um die Geschichte der Entwicklung und der Produktion von Automobilen in der Region (in der übrigens auch der Trabbi produziert wurde). Abends fand u. a. ein



Kostümball statt (natürlich unter dem Motto Feuerwehr), es gab tolle Konzerte von Ĵele (Elena Wilke aus Schwedt und Ĵenja aus Bremen mit Unterstützung von Geomar aus Kuba) und Kaŝi (Carsten Schnathorst aus Hamburg) sowie eine „Magische Reise um die Welt“ der Zauberbühne von Christoph Frank. Außerdem gab es noch ein Osterfeuer, einen Quizabend und den traditionellen internationalen Abend mit Beiträgen der Teilnehmer. Für den gesamten Abend stand immer eine Kneipe zur Verfügung – dort wurde gespielt, getrunken und natürlich sehr viel Esperanto gesprochen. Kurzum: alles in allem wieder eine sehr gelungene Veranstaltung, die das PSI-Team organisiert hat – für das 35. PSI in der Jugendherberge Hochspeyer 2019 haben wir uns bereits angemeldet. – Brigitte, Stefan, Franz

----------------------------------------------------------------------------------------------------

## Alke Geveke

* 12. 3. 1959 † 24. 4. 2018

Esperanto war Dein großes Hobby – das hat uns alle besonders mit Dir verbunden.

**Per la memoro pri nia komuna tempo vi ĉiam estas en niaj koroj – fartu bone, kara Alke!**

Esperanto-Gruppe Unterweser und
Esperanto-Landesverband Niedersachsen

Wir sind unendlich traurig! Alke, unsere Esperanto-Freundin, musste uns viel zu früh verlassen.

Alke war seit Februar 2004 – also über vierzehn Jahre – Mitglied unseres Vereins und seit Februar 2005 die zweite Vorsitzende.

Zusätzlich war sie Kassenwartin vom Esperanto-Landesverband Niedersachsen.

Alke hat unser Gruppenleben mit ihren vielen Ideen bereichert. Von ihren vielen Esperanto-Reisen ins In- und Ausland – sowohl anlässlich von Kongressen als auch von privaten Reisen – berichtete sie leidenschaftlich bei den Gruppenabenden. Nicht nur an diese Abende werden wir uns noch lange erinnern.

Wir waren immer beeindruckt von ihrem Reisemut und ihren vielseitigen Aktivitäten.

Ihre liebenswerte, aufgeschlossene, humorige, interessierte, hilfsbereite Art wird uns persönlich und in unserem Gruppenleben fehlen.